

LA CENTROJ KAJ LA SEKCIOJ DE ISAE

Terminologia Centro (TC) de ISAE kunordigas la terminologian esperantistan laboron de unuopuloj, pligrandigante la lingvan riĉecon de Esperanto en diversaj fakoj. TC organizas la diskutadon pri terminologiaj problemoj, kontrolas fakterminarojn, aperigas provizorajn fakterminarojn (kiel rekomendojn de ISAE) kaj rekomendas por la publikigo jam maturajn fakterminarojn.

La aperigataj (multobligataj) terminaroj de TC estas destinitaj al la interna uzo de fakuloj kaj ili estas riceveblaj de TC senpage, kun nur morala devo de la ricevonto subteni (per propra aŭ kolektita monsumo) la fondaĵon »Scienco« (el kies rimedoj oni pagas la multobligadon de la terminaroj).

La direktoro de TC estas dipl. inĝ. R. Haferkorn (Edeldorfer Weg 28a, 8480 WEIDEN i.d. OPf., Germanio okc., BRD) kaj lia anstataŭanto estas inĝ. A. Broise (La Madeleine, F-27 NONANCOURT, Francio).

Arkitekt-konstruista sekcio estas ISAKE (Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistoj). La sekcia kotizo (10 steloj jare) estas pagebla pere de la delegita reto de ISAE (kune kun la jarkotizo por ISAE). La sekcio havas sian komitaton kaj la laborgrupojn en kelkaj landoj. La kontaktadreso estas: Ark. Tekn. VI. Štrucelj, Krašova 27/IV, ZAGREB, Jugoslavio.

Medicina sekcio estas UMEA (Universala Medicina Esperanto Asocio), kun la propra komitato (la kontaktadreso: D-ro Maria Jarnuszkiewicz, Kurjawska 13/1, KRAKOW, Pollando). La sekcio havas sian organon **Medicina Revuo**, kies jarabono estas 15 steloj, pagebla kune kun la kotizo por ISAE (10 st.) kaj kun la sekcia kotizo (5 st. jare) pere de la delegita reto de ISAE.

Filologia sekcio estas IUEF (Internacia Unuiĝo de Esperantistoj Filologoj). La sekretario de la Komitato estas Lj Marikin, kompl. Toltoj, 23/—/2/IV, SOFIO, Bulgarujo. La sekcia kotizo estas 6 steloj jare (pagebla same pere de la delegita reto de ISAE).

Geologia sekcio direktis sin ĉefe al intervenoj por oficialigi Esperanton en internaciaj geologiaj kongresoj kaj al kreo de la faka periodaĵo GEOLOGIO INTERNACIA. La gvidanto de la sekcio estas d-ro J. Kavka (Lužna 7, PRAHA 6-Vokovice, Ĉeĥoslovakio). La kotizo estas 15 steloj — kune kun la abono al Geologio Internacia — pagebla pere de la delegita reto de ISAE.

Astronomia sekcio estas nombre malgranda, sed klopodas vastigi la agadon inter ĉiuj astronomoj kaj aperigadi apartajn fakajn kajerojn de Sciencia Revuo. La adreso: Prof. B. Popović (Ognjena Price 80, BEOGRAD, Jugoslavio). La jarkotizo 5 st.

Teknikista Ligo de ISAE estas la plej nova sekcio de ISAE, ankoraŭ en organiza stato, sed jam multnombra. La kontaktadreso estas: Teknika Komisiono de Hung. Esp. Asocio. Kenyermző u. 6, BUDAPEST VIII, Hungario).

EL SCIENCA REVUO de Internacia Sciencia Asocio Esperantista,
Vol. 20 (1969.), n-ro 3/4

523.842+523.814:521.34

APSIDA MOVIĜO KAJ STELSTRUKTURO (A. Heck,*) Jalhay, Belgio)

Enkonduko.

La duoblaj steloj okazigas grandan intereson en astronomio, ĉar ilia studo estas la reĝa vojo kaj la ununura vojo al rektaj informoj pri la maso kaj pri la strukturo de steloj.


Kiam la distanco inter la du steloj de duobla sistemo estas granda, ĉi-tiuj estas konsidereblaj kiel materiaj punktoj kaj ili orbitas elipse ĉirkaŭ la pezocentro de la sistemo. La kono de tiuj trajektorioj permesas havigi informojn pri la stelaj masoj (klasika problemo de la du korpoj).

Kiam kontraŭe la steloj estas sufiĉe proksimaj, ili deformadas sin unu la alian kaj la relativa orbito — ne elipso kiel antaŭe — dependas samtempe de la deformaĵoj kaj de la strukturo de la du steloj. En ĉi-tiu artikolo ni prizorgos la jenan kazon konsiderante du deformaĵojn:

— deformaĵo per tajdoj konsistanta el plidikiĝo simetria rilate la linion kunigante la centrojn de la du steloj,

— deformaĵo per la rotacio de ĉiu stelo konsistanta el platiĝo simetria rilate la rotacian akson.

Kiam la antaŭaj deformaĵoj estas sufiĉe malgrandaj, diversaj aŭtoroj demonstris ke la relativa orbito reprezentigas per elipso kiu moviĝas laŭ malrapida regula rotacio (apsida movado), ligita al la du deformaĵoj.



DES. 1

*) provizora esploristo de F.N.R.S.